

Numero: 319.
Decembro: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Benitan Kristnaskon!

Mi ne komencas ĉi enkondukon kun belega, neĝa pejzaĝo. Jam delonge ne neĝas kristnaske.

Ĉio ŝanĝiĝis. Ankaŭ la vetero. Nia klimato fariĝis pli varma kaj milda.

Mi rememoras, infanaĝe kiom grandaj neĝoj estis en mia vilaĝo.

Komence de decembro ekneĝis kaj preskaŭ ĝis marto la pejzaĝon kovris blanka neĝo.

La vetero estis frosta. La riveroj kaj lagoj glaciigis invitante nin glitkuri.

Ho, tiuj belegaj infanaĝaj jaroj! Bone pensi pri ili en tiuj ĉi semajnoj kaj tagoj.

Mi atendis Sanktan Nikolaon kun mia patrino en la kuirejo. Eble mi estis kvinjara kaj neatendite ĉesigis la elektra lumo.

Longajn minutojn ni sidis en la mallumo. Mia patrino ekbruligis kandelon. Ĝia pala lumo lumigis la kuirejon. Ĉio estis ege mistera. Kvazaŭ ekstere estis aŭdeblaj pezaj paŝoj.

Li alvenas – mi ĝojegis. – Sankta Nikolao alvenis kaj li alportis por ni donacon.

La vitro de la fenestro skuetis. Jes tie estas Sankta Nikolao – mi pensis.

Mi ekscite provis rigardi tra la malhela fenestrovitro, sed mi vidis nenion. Sed mi sentis, tie staris la blankbarba oĉjo, kiun mi tre, tre atendis kun mia patino.


La flagranta flamo de la kandelo eksaltis pliigante mian eksciton.

Mi tremis. Mia patrino karesadis mian kapon, kiam la elektra lumo revenis. Mia bona panjo milde diris:

— Ĉi tie estis Sankta Nikolao.

Mi neniam povas forgesi ĉi tiun vesperon.

— Redaktanto —



Peto de la knabeto

Knabeto skribis longan leteron al la Jesueto. En tiuj ĉi tagoj preskaŭ ĉiuj infanoj prenas skribilon por skribi al Jesueto. Ili petas multe da ludiloj, fabelolibrojn, ĉokoladon, sukero kaj kompreneble bele ornamitan pinarbo.

La knabeto kliniĝis super la blankan paperon kaj li cerbumis.

Kion li petu? Kiu ludilo mankas el la infanoĉambro. Li jam havis elektran vagonaron, sportan aŭton kun speciala ŝoseo kaj miniaturaj dometoj kaj konstruaĵoj. Ankaŭ de fabelolibroj estis plena la librobreto.

Li ne sciis, kion li petu de Jesueto.

Ne estas peto la ornamita pinarbo. Ja, ĝi apartenas al Kristnasko. Ĝin ricevas ankaŭ la malbonaj infanoj.

Antaŭ li la blanka papero estis timiga. Kion skribi? — Li ne skribis.

Li nur rigardis la paperon, kiu similis al granda, neĝa pejzaĝo.

Kio mankas el la domo? Almenaŭ iu helpus al li. Sed nun li estas hejme sola. Liaj gepatroj forestas. Eble estus bone, se li atendus ilin.

Jam preskaŭ forĵetis la blankan paperon, kiam el la najbaro aŭdiĝis kriegado, laŭta disputado, eĉ la ploro de knabino.

Li bone konas Elinjon. Ŝi estas blonda, ĉarma knabino. Denove ŝia paĉjo ebriiĝis kaj li batas la familion.

Tiu ĉi ripetiĝas preskaŭ en ĉiu vespero. Morgaŭ la knabino iros al la infanĝardeno kun larmaj okuloj.

Kial ne estas paco kaj amo en ĉiuj familioj? Kial ne estas paco kaj amo en la mondo? La homoj militas. Bomboj falas el la ĉielo murdante malfeliĉajn homojn.

La knabeto ekskribis sur la blankan paperon:

„Kara Jesueto! Mi havas nur unu peton. Portu pacon kaj amon por la tuta homaro!

— Ŝaŝa —



Kristnasko sur la bataalkampo

Antaŭ multaj jaroj, kiam ankoraŭ mi estis malgranda knabeto, mia avo rakontis al mi en iu vintra posttagmezo.

Mia kara avo partoprenis la unuan mondmiliton. Li batalis en Italio kaj en Pollando.

Mi ŝatis aŭskulti liajn militajn travivaĵojn. Li ekbruligis sian pipon kaj li diris:

— Ni estis sendita al la Pollanda bataalkampo kontraŭ la rusoj. Estis terura milito. Miaj soldataj kamaradoj falis unu post la alia pere de rusaj armiloj. Kompreneble ankaŭ ni heroe batalis, eĉ ofte ni kontraŭatakis. Malgraŭ tio la fronto de la armeo estis senmova.



Ni jam sidis en la bataalkavoj de post semajnoj. Estis tre malvarme, ĉar alvenis la vintro. La pejzaĝon kovris granda, blanka neĝo.

Proksimiĝis Kristnasko. Ni jam ne esperis, ke ĝis tiu festo ni povos hejmeniri. Ni ĉiuj sciis, en la bataalkavo ni pasigos la Sanktan nokton, se dume ni ne estos mortpafitaj.

Alvenis Kristnasko. Ni estis ege tristaj, ĉar tre mankis al ni ĉiuj la familianoj, la varma, paca ĉambro, la sono de la hejma sonorilo de la preĝejo de nia vilaĝeto.

Sidi en la frosta bataalkavo kaj rigardi kaj nuban, kaj ĉielan firmamenton ne estis agrable, eĉ tio estis por mi tre doloriga.

Vere estis hejtita ŝirmejo sub la tero kaj ni klopodis isntali ĝin hejmece. Tamen ni estis en fremda lando kaj ni ne sciis, kiam ni povos hejmeniri.

La komandanto akiris de ie pinarbon. Ni ornamis ĝin ka ĉirkaŭstarante ni kantadis kristnaskajn kantojn. En niaj okuloj brilis larmogutoj.

Neatendite iu soldato enkuregis la ŝirmejon kaj diris:

— Transe la rusoj ekiris. Ek! Prenu la pafilon kaj ni prepariĝu por la batalo.

Rusoj ne kutimis ataki nokte. Strange, ke ili ekmovis. Ŝajne ili proksimiĝis al ni. Ili ne estis multope. Venis tri aŭ kvar rusoj portante ion en la mano. Ĝi estis lumigita fare de kandeloj.

El ni iu rimarkis:

— La rusoj festas Kristnaskon la 6-an de januaro. Kion ili deziras.

Kiam jam ili estis sufiĉe proksime al ni en rusa akcento, sed hungare iu kriis:

— Ne pafu! Ni venas amike. Ni scias ĉi nokto estas por vi sankta. Akceptu de ni ĉi tiun ornamitan pinarbon.



Ni elgrimpis el la bataalkavo kaj post minuto ni staris vid al vide al „niaj malamikoj”.

Ni mute rigardis unu la alian. Ni sciis, hodiaŭ nokte ni estas amikoj, sed morgaŭ aŭ postmorgaŭ ni murdos unu la alian.

Kiam finiĝos ĉi terura kaj sanga milito, ni ne sciis. Mortpafi fremdulon, kiun ni vidis neniam. Kial?

Mi ne scias, kiom longe ni staris sur la neŭtrala zono kaj ni hungaroj kun la rusoj rigardis la flamon de la kandeloj.


Malrapide la kandeloj estingiĝis. Estis malhela nokto kaj malproksime sur la firmamento eta stelo ekbrilis.

La vintra vento ekkraesis nian vangon, kvazaŭ patrino sian filon.

La vento flustris: „Homo, kial vi militas? Ja, vi povus vivi pace unu kun la alia.

Mia avo finis la rakonton. Li bonguste suĉis el la pipo kaj ekiris por fermi la kokinojn, ĉar jam estis vespero.

— Apáti Kovács Béla —



Poezio

Nicolino Rossi

Misrenkontoj

Vizaĝo via fulgonigras,
 ŝvitperloj migras
 survange
 kaj l'okuloj ruĝas rande
 dum spirado malfacilas
 minejfunde, kie lum' etbrilas.
 Mi vidas vin labori dure,
 suferi senmurmure,
 penege ŝviti:
 mi hontas vin eviti,
 vin ignori, mia Kristo,
 forgesita karbministo.

En banko ĉe-giĉete,
 akurate kaj diskrete
 vian tagrutinon vi plenumas.
 Via rideto lumas
 al ĉiu rapidema bankkliento,
 sed neniu sento
 min avertas,
 ke miskonata Kristo certas
 antaŭ mia vivo.
 Kaj rekaptiĝas mi en l'efemerodrivo,
 en vana feliĉpostkuro,
 dum intiĝas la futuro
 kaj re kaj re miskone mi mistrapas
 vin, ho dia Forgesito,
 plenumo de l' karito.



Mauro Nervi

Tristan

Mild und leise wie er lächelt...

Kie kurbigās maro, horizonte,
 montokrestoj aperas (sub kupolo
 el nuboj ili ondas); sur ĉi surfaco
 ŝipoj leĝere glitas, kaj l' ventoj interkrucaj
 puŝas ilin diverse (viaj blankaj
 manoj) dum fine de ĉi polva kajo sago indikas
 la nordon (al brumoj mi navigas, sed
 per rideto apenaŭa, ho reĝino, ni invitas
 unu la alian al gajo kaj ŝercado; mi karesas vin
 inter vango kaj lipoj, per senhezitaj
 fingroj). Ĉirkaŭ la framo de malkonstruata
 ŝipo, laboras ĉarpentistoj; regultakte
 elfalas traboj en la maron, kaj ekplaŭde
 bruegas, ehiĝas tra l' baseno; rapide
 ili mergiĝas en la grizon – sed nur mi
 la detruon de l' ŝipo rimarkas kaj kompatas:
 tie, sur benko, sterniĝas junulino
 lunece pala, kun violaj
 makuloj surfrunte; palpebrojn ŝi mallevas
 kaj rigide senmovas (viajn ŝultrojn, ho Isolde,
 mi kaptas kaj premas kontraŭ mi, dum mia mano
 al via flanko glitas; maltrankvilo
 kreskas en mi – ho esti unu, en ĉi maro, en ĉi
 morto); al vi, al vi mi ja revenus, ho akvo
 senfina (velo, kapee pro l' ventego,
 krozadis malproksime), al vi mi paŝas dezirplene,
 sur la asfalto de ĉi kajo (ek,
 post kurba flugo la ŝaŭmkrestajn hulojn tanĝis
 mevo, kaj l' ventron de mortinta fiŝo
 bekis subite); al vi, ho maro, mi ekdrivus volonte,
 kaj al viaj vastoj mian ŝipon el korko mi konfidus,
 al vi, kies ondoj konstante horizontas ekster nia
 rigardo, en indiferento
 feliĉa, transe de niaj silento kaj doloro.
 (Sub laŭta vento kaj en novnaskita helo
 alte sarkasmas la Duinaj turoj
 tamen, kaj malgraŭ mia mishumor'
 moke rebrilas...)

Triesto, la 3an de novembro 1982



Por infanoj



MIA KATETO

Mi havas kateton
 kun bela buŝeto
 kaj oreletoj
 ĉion aŭdantaj.
 Kun lipharoj,
 kiel bravulo
 estas mia gaja
 murmuretulo.
 Ĝiaj okuletoj
 estas ruzaj
 jen kuntiritaj,
 jen malferkitaj.
 Ĉu ludas aŭ kuŝas
 mia ruzuleto,
 kiel ĉiu kato
 liberon ŝatas.

Elena Popova



Studentumuro

— Sinjorino instruistino, ĉu vi povas doni al mi papernasztukon? — diras iu lernantino
 — Jes, komprebele, se vi venos ĉi tien.
 Post iom da tempo alia lernanto diras:
 — Sinjorino instruistino, ĉu vi povas doni al mi 20 eŭrojn?

—

Du knaboj babiladas:
 — Hodiaŭ mi ne lernis.
 La alia demandas:
 — Ĉu vi kutimis?

—

— Panjo, mi renversis la ŝtupetaron.
 — Ve Dio mia! Kio okazos se via patro sciigos pri ĝi.
 — Li jam scias. Li pendas de sur la lustro.

—

— Paĉjo, en la lernejo mi ne sciis, kie estas Afriko.
 Ĉu vi scias?
 — Mi ne, sed bonvolu demandi vian panjon.
 — Panjo, kie estas Afriko?
 — Laŭ mi ĝi estas tute proksime, ĉar en nia fabriko laboras du afrikanoj kaj ĉiutage ili veturas per biciklo hejmen.



Prosperan novan jaron por 2019

Prosperan novan jaron por 2019

